

La Ora Eskudo por la naturprotektado

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-827/297, 1979 aŭgusto 16 kaj 18

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-44/SRI-1979-44-B-6-297-827-1979-08-16-18-Claude-kaj-Andree-Gacond-La-Ora-Eskudo-por-la-naturprotektado.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

La pasintan semajnon ni rakontis kiel, sub la influo de la organizaĵo Ligo Svisa por Natur-Protektado, la svisa popolo edukiĝis koncerne la respekton de la pejzaĝoj kaj de la domoj. Ni interalie menciis la pozitivan rolon de la lernejoj por diskonigi la admonojn de la gvidantoj de Ligo Svisa por Natur-Protektado.

A.- Ni vidu hodiaŭ kiel la lernejo ludis kaj daŭre ludas fundamentan rolon por eduki la popolon favore al la natur-protektado.

Cl.- Enirante svisan lernejon vi plej ofte rimarkas belajn afiŝojn, kiuj montras kiujn florojn kaj bestojn oni devas nepre protekti, tio signifas absolute ne pluki kaj ĉesi mortigi. La gelernantoj, kiuj daŭre pasas antaŭ tiuj ĉi belaj fotoj de floroj kaj de batracioj kaj reptilioj intimiĝas almenaŭ kun ilia bilda aspekto kaj tutcerte kun la nocio mem, ke ekzistas kreskaĵoj kaj animaloj, kies vivo estas minacata de la sinteno mem de la homoj.

A.- Unufoje en la jaro Ligo Svisa por la Natur-Protektado sendas al ĉiuj instruistoj de la elementa instruado specimenon de nova Ora Eskudo kun sciigoj pri la naturprotektata agado kaj domprotektata kampanjo, kiujn la profito de la vendo de tiu ĉi ĉokolada monerego permesos entrepreni. Ĝenerale la instruistoj profitas la okazon por diri al la gelernantoj kelkajn vortojn pri la natur- kaj dom-protektado, pri la organizaĵoj Ligo Svisa por la Natur-Protektado kaj Ligo Svisa por la Nacia Heredaĵo, ĝenerale nomataj helpe de la germanlingvaj mallongigoj Naturschutz kaj Heimatschutz, kaj pri la antaŭviditaj agadoj. Multaj gelernantoj sin ĝenerale proponas por vendi Orajn Eskudojn.

Cl.- Tiun ĉi vendon ili efektivas ekster la lerneja horaro. Ili proponas la ĉokoladan moneron, kiu kostas du frankojn, al siaj gepatroj kaj parencoj kaj al siaj najbaroj. En la vilaĝoj la vendo estas eĉ tre sisteme organizita de la instruistoj, por ke la infanoj ne sonorigu dufoje ĉe la sama pordo, sed por ke tamen ĉiu domo estu tuŝita. En la urboj tia planado ne estas ebla.

A.- Radio- kaj televido-elsendoj kaj gazet-artikoloj anoncas la vendon de la Oraj Eskudoj kaj ofte tre detale raportas pri la celo mem de la agado: oni povas vidi fotojn de la restaŭrotaj domoj aŭ urb-kvartaloj kaj de la aĉetotaj natur-protektejoj. Intervjuoj kun fakuloj permesas scii, kial la koncernaj pejzaĝoj meritas absolutan protektadon aŭ monhelpon. La gvidantoj de Ligo Svisa por Natur-Protektado tutcerte detalege planadas tiun ĉi informan fazon de la agado. Kiam la infanoj sin prezentas kun la anoncitaj Oraj Eskudoj, ilin malavare atendas la plenkreskuloj. Tiel la vendo de la Oraj Eskudoj rapide disvolviĝas, kaj ĉiuj estas kontentaj: la natur-protektaj kaj dom-protektaj ligoj, kiuj povos plenumi siajn reciprokajn funkciojn, la aĉetintoj kaj la vendintoj, kiuj sin sentas utilaj kaj partoprenantaj indan agadon.

Cl.- Oni neniam sufiĉe mencias la psikologian gravecon de tiaj agadoj. La infanoj ne nur intimiĝis kun la nocio mem de la naturprotektado, sed akiras senton de kunresponseco. Ili sentas, ke dank' al ilia sindono dekfranka aŭ eĉ pli granda monsumo povis esti kolektita, ili eĉ

fieras pri la vendosumo de la klaso, kiu ofte atingas plurajn centojn da frankoj. La plenkreskuloj per la aĉetgesto havas la okazon esprimi sian moralan apogon al la ideo mem de natur- kaj dom-protektado. Ofte ili bone notas la nomojn de la protektotaj lokoj, en la intenco iri ilin viziti.

A.- Ekzistas alia psikologia aspekto, kiu ludas gravan rolon. Multaj gelernantoj rakontas, ke la maljunuloj ne nur malavare aĉetas la Orajn Eskudojn, sed ke ili donacas ilin al la junaj vendantoj por manĝi. Kelkaj izolitaj olduloj fakte senpacience atendas tiujn kontakt-momentojn kun infanoj por enirigi la junajn eskud-kolportistojn, por havi kun ili konversacian momenton. Kelkaj oldulinoj, se estas la kvara horo posttagmeze, proponas eĉ tetrinkadon kaj biskvitojn. La infanoj kelkfoje reiras viziti tiujn invitemajn izolulojn. Ligoj inter la generacioj kreiĝas.

Cl.- Ho, ekzistas ankaŭ grumblemuloj, kiuj apenaŭ malfermas la hejman pordon kaj insultas la kolportistojn. En la lernejo la infanoj lernis, ke eĉ al tiuj ĉi malkontentuloj oni devas afable ro respondi, senkulpiĝante pro la ĝeno alportita.

A.- En la vilaĝoj la infanoj devas ofte respondi al multaj demandoj, ĉar la aĉetantaj plenkreskuloj profitas la okazon por koni la nomojn de la junaj vendantoj, por scii kies gefiloj ili estas kaj fari rimarkojn pri ilia simileco aŭ malsimileco kun la gepatroj kaj aliaj de ili konataj parencoj. Ankaŭ tiuj ĉi rilatoj inter-generaciaj tute certe havas siajn sociologiajn utilojn.

Cl.- Ekzistas aliaj tradiciaj filantropaj vendoj, kiuj kontaktigas la gelernantojn de la elementaj lernejoj kun la plenkreskularo. La plej populara estas tiu de la organizaĵo "Pro Juventute", kiu proponas belajn poŝtmarkojn kaj kristnaskajn aŭ novjarajn salutkartojn. Ankaŭ okaze de tiu ĉi agado, kiu devigas la junajn kolportistojn dufoje kontakti la plenkreskulojn, por la mendo-registro kaj por la livero, la infanoj estas ofte agrablege ricevataj de la aĉetmuloj kontektemaj.

A.- La lernejo ne nur uzas vendo-rimedojn por eduki la infanaron favore al la natur-protektado. La instruistaro estas petata fare de Ligo Svisa por la Natur-Protektado kaj de la Instru-Aŭtoritatoj, atentigi la lernantaron pri la indeco lasi puran lokon kiam oni piknikis. Eĉ tutaj lernejoj partoprenas purigajn ekskursojn por rikolti en sakojn la rubaĵojn, kiujn disĵetis nezorgemaj turistoj, kamparanoj aŭ urbanoj ne ankoraŭ naturrespektemaj tiurilate. Tiam la ĵurnalistoj profitas la okazon fari raporton kun fotoj, en la celo konsciigi la legantaron pri la indeco de la naturprotektado kaj pri la malbeleco de la rubaĵinunditaj talusoj. Tiuj ĉi artikoloj efikas, ĉar post la koncernaj agadoj la pejzaĝoj ĝenerale restas puraj. Eĉ la fremduloj vivantaj en Svislando kiel gastlaboristoj iompostiom solidariĝas kun tiuj ĉi agadoj, reprenante ekzemple siajn rubaĵojn hejmen post pikniko en la kamparo, anstataŭ kaŝi la malplenajn botelojn kaj skatolojn sub la ŝtonojn aŭ en la heĝojn.

Cl.- Ĝuste pri la naturprotekta rolo de la heĝoj ni parolos la venontan semajnon.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!